

## GREZILJONO - julio 2021

fine de julio ni pasigis unu semajnon en nia Esperanto-kastelo Greziljono. Ĝi situas du kilometrojn de la urbeto *Baugé* (Boĵe), kie ankaŭ troviĝas kastelo, kiun ni vizitis. En la Luarvalo troviĝas multaj kasteloj, burgoj, ruinoj kaj diversaj fortikaĵoj.

Ekde la 23-a de julio ĝis la 2-a de aŭgusto 2021 okazis en la Kulturdomo de Esperanto - kastelo Greziljono pluraj Esperanto-eventoj: la 5-a Maratona E-kurso, la 33-a Internacia E-konferenco (IEK) pri "Naturo, Scienco, Arto", dutaga 75-a Aktivula Maturigo (AMO) pri "Kulturo pere de Esperanto" kaj ekzamenoj de la Franca Esperanto-Instituto (FEI).

La aranĝon partoprenis kvardek geesperantistoj, plejparte el Francio. Okazis trinivelaj E-kursoj, gvidataj de renomaj esperantistoj: Ilona Koutny, Renée Triolle kaj Marc Giraud. Atenteme ankaŭ aŭskultis hundino "Perla" de Catherine Kremer.

Ni ĉeestis nur partatempe por ĝui Esperanto-etoson en tiu bela kastelo. Ni frekventis la kurson de Ilona Koutny, kiu naskiĝis kaj edukiĝis en Hungario, sed ekde la jaro 1997 loĝas en Pollando en la urbo Poznan, kie ŝi gvidas postdiplomajn Interlingvistikajn studojn ĉe la Universitato Adam Mickiewicz.

En la programo estis inkluzivitaj diversaj interesaj prelegoj, ekskursoj en la ĉirkaŭaĵo kaj al pli foraj lokoj. La tuttaga ekskurso gvidis nin al urbetoj *Langeais* kaj *Azay-le Rideau*, kie troviĝas kasteloj. Mi kun Floreal preferis promeni kaj admiri tiujn pitoreskajn urbetojn. Revene de la ekskurso ni por momento haltis rigardante la reĝfortikaĵon *Chinon* kaj en la urbo *Saumur* ni preterpasis alian kastelon.

Dum la semajno okazis prelegoj pri kronviruso, Catherine Kremer parolis pri la Renesanco antaŭ la ekskurso. Renée Triolle parolis pri franca literaturo en Esperanto kaj prezentis bildojn pri Provenco - ŝia bela regiono. Ilona Koutny parolis pri esperantlingva bildo de la mondo. Andreo Grossmann prezentis trompajn bildojn kaj rakontis ŝercojn. Prelego pri jidaj lingvo kaj kulturo prezentis Elias Seidowsky.

Dum la AMO-seminario François Lo Jacomo prizorgis videokonferencon kun Stefan MacGill, kiu bonvenigis la partoprenatojn kaj transdonis parolon al la aliaj prelegantoj kun kiuj ni povis komuniki surekrane. Ĉe la fino li skizis AMO-seminariojn de 1 ĝis 75.

Renée Triolle el Francio prezentis: Esperanto-kaŝita interkulturilo. François Lo Jacomo el Francio prezentis: Esperanto-kulturo aŭ kulturo pere de Esperanto? Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova el Rusio parolis pri Libro-eldonejo Impeto. Malgosia Komarnicka el Pollando prezentis: Esperanto en neesperantista medio - agoj de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado. Ilona Koutny el Pollando prezentis: Esperanta kulturo kaj ĝia instruado. Laure Patas d'Illiers el Francio prezentis: Sciencfikcio kaj Esperanto.

Vespere okazis projekciado de bildoj, diversaj prelegoj kaj diskutoj, kaj poste oni povis ludi tabloludojn aŭ nur babili kun geamikoj. Regis agrabla etoso kaj ni estis kontentaj, ke ni povis renkontiĝi kun konatoj kaj praktiki Esperanton.

Revene hejmen ni haltis en la urbeto *Le Lude*, kie ankaŭ troviĝas impona kastelo. Mi promenis en ĝia ampleksa ĝardeno. Daŭrigante survoje ni enrigardis la korton de la kastelo *Châteaudun*. Restis ankoraŭ longa vojo por atingi nian hejmon.



Fotis kaj aranĝis Liba kaj Floreal Gabalda